

Grava, sed ne sufiĉe legata

■ Paŭlo S. Viana

Eldonistoj tra la tuta mondo kutimas diri, ke publikigi librojn de poemoj ne estas profitdona negoco. Ili malmulte vendiĝas. Kaj ju pli moderna fariĝas la mondo, ŝajne des malpli interesataj de poezio estas la novaj generacioj. Escepto al tio oni povas konsideri nur la tekstojn de kanzonoj.

Tio estas vere konsterna novaĵo en la mondo. Poezio ĉiam estis gravega elemento en la starigo de kulturo en ĉiuj popoloj. Oni povas diri, ke efektive literaturo ĉie komenciĝis per longa poemo. Estas eble mencii plurajn ekzemplojn: la epopeo de Gilgameŝ, en Sumero (Mezopotamio), preskaŭ 3000 jarojn a.K.; *Iliado* kaj *Odiseado*, atribuitaj al Homero, en la 8-a jarcento a.K.; *La Dia Komedio*, de Dante Alighieri, en la 14-a jarcento p.K.; *La Luzidoj*, de Camões, en la 16-a jarcento p.K.; *Kalevala* en la 19-a jarcento, kiu donis kulturpersoncon al Finnlando. Oni konsideras, ke poezion la homoj verkis eĉ antaŭ ol verki prozaĵojn. Ĝi do sidas en la homa menso profunde kaj prae. Indas konservi kaj flegi tiun antikvan magion.

Esperanto: kulturlingvo

Se Esperanto vere estas kulturlingvo, ĉu ĝi sekvis tiun saman vojon havigi al si poezian fundamenton?

Nu, kiam Zamenhof unuafoje

ekspedis al diversaj homoj siajn ekzemplerojn de la Unua Libro, kaj komenciĝis por li aflikta atendado de reagoj, kion li faris? Li verkis poemon. La konatan *Ho mia kor'*, kiu cetere fariĝis klasikaĵo. Kompreneble, tio ne sufiĉis por fundamenti la kulturon de la lingvo. Li kaj aliaj aŭtoroj daŭrigis la starigon de literaturaĵoj, traduke kaj originale, ĉar ili sciis, ke literaturo estas esence grava por vivo de lingvo. Kaj tio bone funkciis kaj faris, ke Esperanto estas unika fenomeno – planita lingvo, kiu fariĝis “normala” lingvo. Sed mankis dum certa tempo granda poemo, kiu funkciu por Esperantistoj kiel *La Dia Komedio* por italoj (oni konsideras, ke ĉi tiu verko grave kontribuis al la unueciĝo de la itala nacio, laŭ lingva kaj eĉ politika aspektoj, en duoninsulo, kie antaŭe ekzistis nur aro da disaj regnoj). Kaj fine aperis ne unu, sed du tiaj poemegoj: *La Infana Raso* (William Auld, 1956) kaj la *Poemo de Utnoa* (Abel Montagut, 1993). Pri la unua oni sufiĉe amplekse skribas, komentas kaj laŭdas – meritoplene. Sed la dua, same grava, ne estas tre konata, ne tre legata, ne sufiĉe menciata kaj laŭdata. Mia celo ĉi tie estas modeste kontribui kontraŭ tia stranga flanklaso.

La *Poemo de Utnoa* estas eksterordinara verko. Legante ĝin, oni ne povas eviti miregon pri la koncepto

kaj formo, paĝo post paĝo. Publikigis ĝin la eldonejo Pro Esperanto, en Vieno, kaj mi ne trovis informon pri dua eldono, ĝis nun. La libro estas grandformata broŝuro kun sobra, trikolora kovrilo, klara preso kaj bona papero. Ĉe la komenco de ĉiu ĉapitro vidiĝas bela desegnaĵo kongrua kun la koncerna enhavo.

La formo


La tuta epopeo konsistas el sep ĉapitroj kaj pli ol 7000 versoj. Ili estas senrimaj, sed bele ritmaj, ĉiuj kun 15 silaboj (se oni enkalkulas la lastan, neakcentan silabon), kun ĉiama forta akcento sur la sesa silabo, kio donas tamburecan sonon al la versoj kaj invitas al voĉlegado: estas vere plezuro voĉlegi la tuton, plonĝi en la muzikon de tiuj longaj versoj. Oni povus diri, ke ĝi funkcias kiel longa, sonora horaĵo. La tuta verko havas preskaŭ ducent paĝojn kaj la eldono proponas enkondukon de William Auld, averton de la aŭtoro kaj postkomenton de Probal Daŝgupto. Kompletigas la eldonon glosaro (la aŭtoro kreis multajn terminojn por karakterizi la kulturon de la fikcia popolo, kiu rolas en la rakonto) kaj liston da klarigoj pri la ilustraĵoj.

La enhavo

La poemo rakontas sufiĉe kuriozan

Ilustraĵoj

La libro havas belajn ilustraĵojn en la komenco de ĉiu kanto. Ĉi sube ni prezentas la ilustraĵojn de la kvara kaj sepa kantoj.



historion. Ĝi kontrastigas la klasikan metrikon, kiu memorigas pri antikvaj epopeoj, kun sciencfikcio. En fora loko en la kosmo, civilizo multe pli evoluinta ol la Tero suferas katastrofon kaj devas konstrui kolonion en formo de grandega kosmosipo por eskapi kaj serĉi alian planedon, kie ili povos ekloĝi. Ili ekscias, ke la Tero suferos inundegon, kiu detruos la tutan homaron. Ili do alfrontas etikan dilemon: ĉu helpi la teranojn, por ke plu ekzistu la homa gento, ĉu lasi, ke ili pereu, tiel ke poste la eksterteranoj okupu la planedon? Observante la homaron, ili konstata, ke ĝi konsistas el tre sovaĝa, kruela, senkompata kaj perfortema, militema gento. Ili ne meritas savon. Se almenaŭ estus sur la Tero unu eta grupo da bonkoraj, pacemaj homoj, la homaro tamen meritis saviĝon. La aliplaneduloj dividiĝas en du partiojn – unu pledas por la forlaso de teranoj al la propra sorto, alia por helpo al la eta grupo da surteraj bonuloj, por ke ili postvivu. La estron de la bonaj teranoj oni do konsilas, ke ili konstruu ŝipon por savo – kio referencas al la biblia mito de Noa.

Sekvas komploto de la opoziciantaj eksterteranoj, kiu kaŭzas teruran masakron de bonuloj fare de rivala homgrupo. Konfirmiĝas la sovaĝeco de tiuj homoj.

Por kuragi Utnoan, la estron de bonuloj, oni montras al li la estontecon de la homaro, se ĝi saviĝos: belegaj lokoj kaj atingoj de la homa civilizacio, en ĉiuj kontinentoj, tra la historio. Poste, la kontraŭa partio montras al li la malbonaĵojn de la homaro, en la estonteco, se ĝi saviĝos.

Utnoa vekiga de tiuj vizioj kaj la poemo finiĝas sen klara konkludo. Kompreneble, la homaro postvivis, sed oni ne scias kiel.

La tuta poemo havas tre kuriozajn aludojn al diversaj epopeoj, en kiuj la aŭtoro serĉis inspiron kaj referencojn: la Biblio, la epopeo de Gilgameŝ, Iliado, Odiseado, Eneado. Li versaĵe intencis aludi pri la graveco de tiuj poemegoj en formado de la homa kulturo. La lerta miksaĵo, kiun li teksis, certe kongruas kun la lingvo, kiun li uzis – la internacia, apartenaĵo komuna de la homaro.

La stilo

Poemo de Utnoa ne estas teksto por komencantoj. La aŭtoro uzas

neordinarajn rimedojn de la lingvo, en maniero tute persona. Li tute ne atencas kontraŭ la gramatikaj reguloj, sed liaj frazokonstruoj postulas certan gradon de subjektiveco, flanke de la leganto. Ni tuj citu ekzemplon:

*Unu rondiron plenan la luno vele navigis
kaj iompostioe la ĉarpentado progresis.
La ŝipo profiliĝis kaj ripoj kornis aeren
dum ili laboradis senĉese, fide, tenace.
(unua kanto)*

Foje la poeto konstruas nekredible longajn (kaj belajn) versofrazojn, kiuj priskribas scenojn metafore, kaj la leganto preskaŭ perdas la spiron, se li legas voĉe:

*Samkiel rinocero en altebena savano
ektimas je brizblovo kaj kontraŭ trunko
koleras,
ĉar vidas ke folioj sin ekbalancas agite,
sencie ĉu ĝi temas pri arbo aŭ
malamiko,
ĉar ĝia vidkapablo estas nur svage
nebula;
ĝi snufas, hufe gratas kaj polvanube
vualas
sunhelon; jen kapklino kaj kun la vosto
rigida,
ĝi sturmas kontraŭ branĉoj, kiuj
senkulpe provokis,
dum grizaj samrasanoj ĉirkaŭe streĉe
rigardas,
ĉu leonego unga inter herbaroj aperos,
tiel dubigis Noan la vivosperto pasinta
kaj li enbruste sentis angoron daŭre
premantan,
dum turnis sian vorton al la kunulo
vojira:*

...
(dua kanto)

Foje li uzas neordinarajn akuzativajn konstruojn kun surprizaj vortumoj:

*Alportis ĝuste tiam nomada roto
surŝultre
la korpon de Irudo, sur branĉoplekto
kadavran.
(sesa kanto)*

Bele li uzas adverbojn:

*... nenio kroma evite fareblas
(unua kanto)
... la kolonioj Gobaj florflugis migri
duope...
(unua kanto)
Ili ĉirkaŭorbitis explore studi la astron...
(unua kanto)*

*... kaj, fruntokline, li tuŝis ambaŭpolme
genuojn
de allasintoj... (unua kanto)*

Neologismojn la poeto ne tre ŝparas, sed ili ne ĝenas. Fakte la vortaro uzata estas ampleksa kaj nuancoplena. Ĉiuj tiuj malfacilaĵoj ne devas malstimuli legantojn. La konstruo de la verko estas tiel originala kaj rafinita, ke post kelkaj paĝoj oni sentas sin en la fluego de potenca torrento, rava kaj nerezistebila. Valoras la penon klopedi.

La aŭtoro

Jesús Abel Montagut i Masip estas kataluno, naskita en la jaro 1953 kaj malpli konata ol li meritas. Li eklernis Esperanton kiam li estis 14-jara kaj ekverkis *Poemo de Utnoa* en 1982. Li publikigis ankaŭ rakonton *Karnavale, La enigmo de l'ar@neo, La lasta eksterordinara vojaĝo de Jules Verne* (Eseo kaj unua ĉapitro) kaj poemaron tradukitan el la kataluna. Li estis plurfoje premiita en beletraj konkursoj.

Oni ne povas (kaj ne rajtas) devigi homojn ami poezion. Sed oni povas (kaj devas) rekomendi, ke ili provu. Tion mi faras, ĉi tie, eble iom kihoteske. Se ili sukcesos, riĉiĝos ilia spirito, kaj ankaŭ la spirito de la lingvo.



Poemo de Utnoa

Abel Montagut. Poezio originala.
Pro Esperanto. Vieno. 1993. 223
paĝoj. Prezo: 18.00 €